Du komunikoj el AMO-1 en ĝia unua tago (la 22an de marto):

# LA UNUA AMO - NEFORGESEBLA

Komenciĝis antaŭ seso da horoj la unua Seminario Pri Aktivula Maturigo (SPAMO 1) en Horány, Hungario. Kvante modesta – dudeko da seminarianoj, kompense kun bonkvalita enhavo kaj altnivelaj diskutoj. Tiom intensas la sesioj, ke la partoprenantoj apenaŭ rimarkas la panoramojn de Danubo principe videblaj tra la forkurtenumitaj fenestroj. La seminario okazas kadre de JER, junulara aranĝo de Hungara Esperanto-Junularo, kiu altiris preskaŭ kvindek partoprenantojn entute.

La kanto de *Beatles* (*All you need is LOVE*) donis la enirpunkton por la seminaria malfermo – kial al ni esperantistoj necesas amo (ekzempe al la lingvo) sed krome AMO – aktivula maturigo. Por teni la parolkomunumon bonfarta kaj progresanta, kaj por konigi nian lingvon al la mondo, ni bezonas homojn trejnitaj kaj kapablaj eluzi modernajn komunik-rimedojn. Tio havas generaciajn aspektojn, ĉar tiuj plej kapablaj regi novajn komunikilojn estas junuloj, kiuj devas dividi siajn kapablojn kun la tuta movada aktivularo. Jen la komenco de la enkondukaj pensoj, prezentitaj de la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill. Tiu plie skizis siajn imgojn pri UEA en trejnprogramoj: ĝi devas preni avangardon, kaj ne plu lasi la kampon al landaj asocioj aŭ aliaj projekto-bazitaj agantoj. Tiuj iniciatoj havas sian valoron kaj rajtas je sia sendependeco, sed UEA agnosku tiun valoron kaj evoluigu partnerajn rilatojn kun ili, por tiel formi koheran mondskalan trejnprogramon. La pruvo de ties bezono estas la granda deziro okazigi seminariojn; sekvos tiuj en Kanado, Ĉinio kaj Italio, kun kandidatoj por 2014 en Togolando, Pollando kaj eble Slovakio.

Kadre de tiu enkonduko, la kvar pliaj gvidantoj prezentis sin. Sekvis duonhora prezentaĵo 'Kiel labori internacie' kune kun diskutoj, kaj prezentaĵoj de unuopaj seminarianoj, el kiuj tri alvenis pere de stipendia helpo donita flanke de UEA.



La seminarianoj pozas sur la ŝtupoj de la SPAMejo, kune kun la partoprenantoj de JER.

Fine de la mateno okazis la unua el la temaj sesioj, tion gvidis Veronika Poór, estrarano de TEJO, principe el Hungario, kun la temo 'Kiel organizi lokan grupon'. Spite tiun titolon, ŝi malfermis amason da pli vastaj temoj: i.a. grup-dinamiko, konflikt-solvado kaj la ecoj de celoj. La prezentaĵo finiĝis per valora praktika tasko, fiksi celojn por si mem, por loka grupo, por landa organizaĵo aŭ alia, laŭ kategorioj Vizio, Misio, Valoroj, Celoj, Strategio kaj Agoj. Ĉiu laboris unue unuope por elekti nivelon kaj difini enhavon por tiuj ses kategorioj. Poste en grupoj (persona, loka, landa, alia) la unuopuloj devis kunlabori por krei grupajn solvojn kaj fine raporti pri ili. Do, la valoro de la ekzerco estis ne nur pro la enhavo, sed krome sperti mem la disciplinon bezonata en la grupoj solvi opini-diferencojn kaj veni al komunaj solvoj.

Posttagmeze prezentis Orlando Raola, pri la diversaj mesaĝoj, kiujn ni devas pretigi por konvinki iun interesiĝi pri Esperanto aŭ eĉ lerni ĝin. Tio retuŝis temojn el pluraj intervenoj el la mateno, kaj spronis viglajn kaj stimulajn intervenojn. Konstato estis, ke kelkaj potencaj argumentoj dependas je la nune unika kaj minoritata pozicio de la lingvo kaj malaperus aŭ transformiĝus, se la lingvo fariĝus pli vaste uzata komunikilo. Tiu prezentaĵo pluiras, sekvos ĝis tagfino du pliaj, kun pliaj sesioj tra la sekvaj du tagoj. Pri tiuj ni raportos en sekvaj tagoj, kune kun fotoj. Sekvos disponigo de seminariaj materialoj.



Jen la seminarianoj: Plej dekstre gvidinto Peter Balaž, kaj tuj malantaŭ li Orlando Raola. Unuavice meze stars Veronika Poór, malantaŭ ŝi Lu Wuncsh-Rolshoven kaj dekstre malantaŭe Stefan MacGill.

La unua komuniko disiris sabate posttagmeze. Sekvas sub la foto la dua komuniko sendita en la sabata nokto kun du alkroĉitaj fotoj

## AMO EVOLUIS

Venis al fino la unua tago da intensa AMO. Tio okazis per du enkondukaj prezentaĵoj, kiuj ricevos daŭrigon tra la sekvaj tagoj – per tio ĉiu gvidanto en la seminario jam kontribuis al la programo de la unua tago. Daŭris la intervenemo, kun utilaj demandoj kaj diskutoj.

Kiel pretigi gazetarajn komunikojn – jen la temo de Lu Wunsch-Rolshoven, kiu pretendis, ke bone preparita gazetara komuniko povas esti bazo por la tre kostefika maniero diskonigi Esperanton per amaskomunikiloj. La pretigo povos okupi unu ĝis du horojn (post spertiĝo!), disiras eble al trideko da ĵunalistoj, kaj se unu aperigas ĝin en loka gazeto, ĝi povas atingi dekojn da miloj da legantoj. Li prezentis diversajn konsilojn pri la stilo, longeco kaj enhavo de bonaj komunikoj. Kiel ĉiam, la sesio enhavis praktikan ekzercon por la seminarianoj: ili ene de dek minutoj devis pretigi nacilingve komencon de komuniko pri la nuna aranĝo, aŭ pri alia renkontiĝo aŭ evento. Cetere, nacia hungara radio morgaŭ venos intervjui unu el la organizantoj de la junulara aranĝo JER, en kies kadro okazas la Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO).

Kiel eluzi modernajn komunikajn teknikojn – jen la temo de Petro Baláž. Pli frue Orlando Raola pensigis nin pri la komunika enhavo – <u>kion</u> ni komuniku por kapti la atenton de diversaj kategorioj de homoj. Petro pensigis nin pri la uzeblaj rimedoj – <u>kiel</u> ni komuniku por atentokapti. Li dismetis diversajn kriteriojn por la uzado de precipe retaj komunikiloj – emfazante la rapidecon kaj neantaŭvideblecon de ŝanĝoj ĉe novaj teknologioj, kun la sekvo, ke ni ĉiun kelkan jaron devas repripensi niajn strategiojn kaj prioritatojn.



La diskutoj tuŝis la temon de la teknologia golfo inter majstrantoj kaj uzantoj de modernaj komunikiloj, kaj tiuj kiuj ne kapablas, aŭ konscie decidas, ne uzi ilin. Ni devas konscii, ke tiu golfo ekzistas ankaŭ inter esperantistoj, kaj ne temas sole pri generacia divido.

Ambaŭ aranĝoj pluiras morgaŭ kaj la seminario postmorgaŭ.

(Aldonitaj estis du fotoj de Petro Balaz, unu de la seminarianoj, la alia pri ili plus la JER-uloj. En la nun kreita PDF-versio de la du komunikoj tiuj du tiam alkroĉitaj fotoj estas aldonitaj rekte al paĝoj unu kaj du de la komuniko.)

# AMO 1 — estu la unua el multaj!